



Kulturaj kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1992 — 2

(APRIL-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



Cart Théophile

... la blinduloj kaj Esperanto (fino)



... Aĥenaton, la hereza faraono.

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A.Frangeu)	2
Turenaj kasteloj (E. Motillon)	3-5
Blinduloj kaj esperanto (Boniol)	6-7
Bileto de barbulo (Th. Cart)	8
Himno al Dio Atono (F. Clary)	9-10
La tri senkantaj mesoj (A. Daudet) (trad. A. Ribot)	11-13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

Sur la paĝo 16 de tiu ĉi numero de la revuo vi legos pri la printempa Infana Renkonto okazinta de la 18-a ĝis la 25-a de aprilo. Dum jaroj, kun René Llech-Walter por gejunuloj, poste kun Frédéric Le Magadure por geknaboj, tiu grava periodo renkontis sukceson. Post duondormado, la Internacia Infan-Renkonto revigligis dank'al Paulette Naulet. Lastan aprilon ĝi akceptis, krom la akompanantaj plenkreskuloj, kvardekon da geknaboj. Naŭ el ili venis el Ĉeĥoslovakio. Ni povis akcepti nur tiun grupeton, kvankam la petoj estis multaj el aliaj landoj, ĉefe orient-eŭropaj. La tuta financa disponeblaĵo de la Fonduso Belbona Espero estis uzata okaze de tiu printempa renkonto. Feliĉe ankaŭ helpis finance G.E.E., Ole Olsson el Svedio, kaj kelkaj

aliaj. Sed la financa bilanco restis negativa pro tio, ke la elspezoj privojaĝaj kaj prirestadaj estis altaj. Sed la sukceso, la rezultoj ĉe la infanoj estis tiaj, ke ni ŝatus denove organizi tian renkonton, eĉ pli ampleksan, venontjare. Ve, eble mankos la mono. pro tio ni ŝatus, ke multaj el vi helpu nin realigi ion similan, eĉ pli grandan. Petoj jam venas el Pollando, Hungario, Rumanio, Rusio ktp. Infanoj el tiuj landoj povus renkonti infanojn el aliaj landoj en Gresillon. Cele al tio ni kreis la Fonduson "Infanrenkonto". Poŝtkarto subskribita de la infanoj estos sendita al ĉiuj helpantoj. Antaŭan dankon.

Sendu vian kontribuon al la Maison Culturelle esperantiste, per bankĉeko aŭ poŝtĉeko (Nantes 1485-39 P) aldonante la indikon: "Por la venontjara Infanrenkonto".

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO EN VIENO-

S-ro Heinz Fischer, prezidanto de la federacia parlamento de Aŭstrio, estas la alta protektanto de la 77-a universala kongreso.

La Bulgara esperanto Teatro prezentos dufoje la "Gastejestrino" de Goldoni, kaj la kamerteatra trupo de Sofio "Fokuso" surscenigos du teatraĵojn originale verkitajn en esperanto.

La Internacia Esperanto-Muzeo akceptos la kongresantojn kun speciala ekspozicio. Post la kongreso ĝi aranĝos kulturen semajnfinojn kun renkontiĝo kun esperanto-verkistoj.

La antaŭkongreso en Prago anonciĝas kun brila kultura programo tra tiu muzea urbo kaj la tuta lando. Internacia seminario solenos la 400-jaran datrevenon de Jan Amos Komenský.

La 59-a kongreso de blindaj esperantistoj okazos en Vieno samdate, kiel la Universala Kongreso.

La internacia infana kongreseto okazos en Melk ĉe Danubo, je 80 km. de Vieno por infanoj 6-12 jaraĵoj.

LA KONGRESO DE S.A.T.: Ni memorigas, ke ĝi okazos en Kaunas (Litovio), de la 5-a ĝis la 15-a de aŭgusto. Informojn pri la kongreso kaj la vojaĝo tien donas: Esperanto-Turismo, 31, rue des Près, 68170 Rixheim.

LA INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI

La 26-a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos en Bratislava (Slovakio) de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto. Loka konferenca komitato: Slovaka esperanto-asocio, Sobotské nám. 6, CS-05801 Proprad, Ĉeĥoslovakio. Administras: Bertil Andréasson, Södra rörum pl. 455, S-24294 Hörby.

EL RUSIO - La unua parto de la sesio de Akademio Internacia de Sciencoj San-Marino (AIS) en Rusio okazis fine de 1991 en Moskvo kaj la dua en Sankt-Peterburgo komence de 1992, kun 180 gepartoprenantoj. La temoj estis "Lingvo, kulturo, ekologio". La dua okazos en Niĵegorod en junio 1993 sub la slogano "Ekologia renesanco de la rusa rivero Volgo". Informas: Vadim Salov, str. Petriŝĉeva 12-615, Dzerĵinsk, Niĵegorod regiono, 606037 Rusio.

RENKONTOJ EN FRANCO-

La Kultura Centro pri Esperanto de Tours organizas intensan staĝon en la kastelo de Taillé, proksime de Tours, la 19-an kaj 20-an de septembro 1992. Kvar kursoj diversnivelaj estos organizataj. Por informoj aŭ aliĝo bonvolu skribi al: Centre Culturel Esperanto de Tours, 6, Avenue du Général de Gaulle, 37000-Tours Tel: 47204395.

Dum la Pentekostaj Tagoj de 1993, la urba turisma asocio de Saint-Lambert-du-Lattay, je 23 km. de Angers, planas aranĝi, per esperanto, feston pri Eŭropo. Tiuĉe ĝi serĉas tuteŭropajn artistojn kaj metiistojn, kiuj povus, indvidue aŭ grupe, prezenti ion pri sia lando. La urba turisma asocio prizorgos la gastigadon. Ebleco de interkonsento pri la vojaĝkostoj. Sin turni al "Esperanto-Grupo "Côteaux-du-Layon", B.P. 5, 49750 saint-Lambert-du-Lattay, Francio.

En Nice, la Esperanto-Grupo intencas aĉeti domon kun kunvenejo kaj unu aŭ du gastoĉambroj. La eventualaj monhelpontoj bonvolu kontakti Robert Llorens, Les Hortensias II, 121bis Bd. Napoleon III, 06200 Nice.

ĈE LA EKOLOGIISTOJ- Dum la Internacia Kongreso 1991 de la verdulaj partioj, en Zuriko, fondiĝis Verdula esperanto-Asocio. La provizora sekretario estas D-ro Alberto Menabene, Via Monti Sibillini 3, 00141-Roma Italio. En Francio, jam de jaroj, funkcias komisiono por disvastigi la internacian lingvon en tiu medio. La komisiito estas: Jacques Morin, Villa Basque, app. 1, 15 rue prof. Calmette, 65260 Pierrefitte-Neustal.

ELDONADO- Aperis nova libro de Cl. Piron: "La communication linguistique". Havebla ĉe la Libro-Servoj. Prinotita de prof. Gaston Waringhien, 18-a eldono de la "Fondamenta Krestomatio", kiu jam en 1903 alportis modelon de literatura kaj lingva stilo al la unuaj esperantistoj (tole bindita).

UEA reeldonis "Metodiko de la esperanto-instruado" de R. Rakuša.

Turenaj Kasteloj

XVIII-a j.c.

Ni vizitu nun la kastelon de Chambord. Tuj, ĝi aperas antaŭ ni, kiel impona feŭda konstruaĵo. Centra grandega ĉefturo; ambaŭflanke, du altaj aloj, kies ekstremaĵojn protektas du altaj turoj. Antaŭ la kastelo, rivero Cosson, deturnita tiucele, figuras larĝan fosaĵon. Sed la multegaj fenestroj, la pintaj turetoj faras el tiu fasado plaĉe harmonian monumenton. Ni eniru tra la ĉefa pordo, la "reĝa" pordo. Meze de la vasta gardista ĉambro, staras miriga duobla ŝtuparo. Ĝi konsistas el du helicoj superstarantaj unu la alian ne kuniĝante. Ilia komuna kerno, arte aĵurita ebligas vidon al ambaŭ helicoj. Tiel, du personoj povas samtempe grimpi la ŝtuparon, vidante unu la alian sed ne povante renkontiĝi. La kastelo ne estas meblita, sed ĝi entenas kelkajn interesajn kuriozaĵojn. Inter aliaj ni rimarku la grandan hejtfornon el blua kaj blanka fajenco, unua provo de racia hejtado. Ni admiru la belan reĝan kaleŝon tutorumitan kaj ... neniam uzitan! Kurioza estas ĝia historio, eretu de la granda franca historio. En jaro 1875, la Parlamento devis alpreni gravan decidon: elekti inter du reĝimoj, ĉu Respubliko, ĉu Monarkio. La pretendanto al la trono, duko de Orleans, estis tiel certa pri la akcepto de Monarkio, ke li antaŭmendis tiun kaleŝon, per kiu li solene eniros en la ĉefurbon, Parizo. La baloto okazis. Respubliko triumfis per unu sola plia voĉo! Gravega evento, kies decidiga kaŭzo ŝajnas tute malgrava: nur la obstino de la pretendanto, kiu nepre volis trudi al la Francoj la blankan standardon de la reĝa familio, anstataŭ la trikoloran flagon, nacia emblemo ekde la Revolucio de 1789.

La grandega parko, 5500 hektarojn vasta, zonita de muro 32 kilometrojn longa, la plej longa en Francujo, estas nun "Nacia parko de konservado kaj bredado de ĉasbestoj".

Nun, ni revenu laŭ la direkto al Tours. Survoje ni haltos en Chenonceaux. El la unua kastelo restas nur unu turo sur la bordo de la rivero Cher. La nuna kastelo estis konstruita je la komenco de la XVI-a jarcento. Ĝi staras sur la fundamentoj de fortika muelilo kaj superstaras la riveron. Ĝi estas tre bela ekzemplo de la Renesanca stilo. Tute apartan originalecon ĝi ricevas de la galerio poste konstruita sur la ponto, kiu kunigis la kastelon al la alia bordo de la rivero. Kun sia parko kaj franca ĝardeno, ĝi estas unu el la plej plaĉaj reĝaj loĝejoj de nia regiono. La ĉambroj, bele meblitaj, entenas kelkajn rimarkindajn pentraĵojn.

Ni trairu nian ekiran lokon, urbon Tours. Je kelkaj kilometroj sude, ni trovas aliajn ĉefverkojn de la Renesanca epoko. Unue Villandry. La stariginto de la nuna kastelo, Jakobo de Etampes, malkonstruigis la primitivan feŭdan fortikaĵon, anstataŭigante ĝin per tiu bela loĝejo. Ĉe la enirejo, dika, riĉe ornamita ĉefturo; ĉe ties piedo, larĝa fosaĵo, plena je akvo. La alta pinta tegmento estas ornamita per luksegaj kaj belaj kamentuboj. Interne, rimarkindaj estas la araba-hispana plafono kaj la muzeo, kie troviĝas valoraj pentraĵoj.

Villandry distingiĝas el ĉiuj aliaj kasteloj per siaj belaj francaj ĝardenoj. Ili estas unika specimeno de la franca ĝardenarto de la XVII-a jarcento. Tiuj harmoniaj geometriaj figuroj borderataj de zorge eltonditaj buskoj estas plej alloga vidaĵo por ŝatanto de belaĵoj.

La kastelo Villandry, riĉa loĝejo kreita de financisto, malmulte partoprenis en la historio de Francujo. Ni nur menciu, ke ĝi estis dum kelka tempo la loĝejo de la fama angla financisto Law, kreinto de la bankbiletoj, kaj iniciatinto de la unua inflacio, tiu plago de nia moderna mondo.

De Villandry la vojaĝo ĝis Ussé ne estas longa. Ni iru ĝis tie. Konstruita proksime de la kunfluejo de riveroj Loire kaj Indre, ĝi superstaras tiun-ĉi. Ĝi estas apogata kontraŭ kreteca klifo, sur kies supro finiĝas la arbarego de Chinon. Vid'al vide, la grizŝtona fortikaĵo de Langeais, sur la alia bordo de Loire, akre kontrastas kun la blankaj ŝtonoj de Ussé. Tiu kasteo estas impona pro la nombro de siaj turoj, turetoj kaj pintaj tegmentoj. Sed ĝia blankeco kaj la florplenaj terasoj ĉe ĝia piedo, lumigas ĝin kaj donas al ĝi agrablan aspekton. Origine potenca fortikaĵo, ĝi ricevis multajn modifojn kaj aranĝojn. Ĝi montras belajn pecojn de la gotika kaj renesanca stiloj. Unu parto, konstruita dum la XVII-a jarcento, estas bela ekzemplo de la klasika stilo. En la korto la ĉarma gotika kapelo invitas al agrabla vizito. Interne, krom la bela arkitekturo kaj la belaj ornamaĵoj, ni admiru la ĥorejajn flankajn preĝbenkojn. Ĝi montras al ni kuriozan ekzemplon de tiuj ripoztabuloj nomitaj "miséricordes" (t.e. "Kompatantoj") dank'al kiuj estis eble konservi dum longaj ceremonioj respektegan teniĝon sen troa laciĝo. Ilia ornamado el delikate ĉizitaj figuroj estas vera kolekto de ĉefverkoj.

Nun, veturante kontraŭflue la riveron Indre, ni iru ĝis Azay-le-Rideau. Tie staras juvelo de la Renesanca arto. En la fluejo mem de la rivero, meze de kvietaj puraj akvospacoj, kiuj respegulas ĝin, aperas la kastelo. Ĝia ĝenerala plano estas tiu de fortika kastelo, sed ĝia simpla ornamado, sen superfluaĵoj, faras el ĝi la plej elegantan kaj plej okulplaĉan konstruaĵon el ĉiuj domegoj, kiujn ni jam vizitis. Interne, ĝi prezentas multe pli da komforto ol la aliaj kasteloj. Ĝia vasta kuirejo kun sia interna puto kaj sia kolekto de malnovaj kuiriloj estas rimarkinda. Enestas ankaŭ bela arta muzeo. Tiu reĝa palaco, nun ŝtata posedaĵo, estas la plej perfekta ekzemplo de la kunfandiĝo de la malnova franca spirito kaj de la itala stilo.

Sendube, kvankam ĝi ne estas la plej grandioza, ĝi estas la plej eleganta kaj plej plaĉa peco de tiu sensimila kolekto de kasteloj starantaj en nia provinco.

Sed jam forpasis unu jarcento, kaj nova stilo ekaperas. Renesanco rivelis al niaj artistoj la belecon de la antikva arkitekturo. La grekaj stiloj fariĝas nova fonto de inspiro. Adaptitaj al pli moderna vivo, miksiĝante kun la franca tradicio, ili naskas la klasikan stilon. Sed dum la XVII-a kaj XVIII-a jarcentoj, la reĝoj ne plu vivadas tiom longe en nia Tureno. Ludoviko XIV-a, la "Sunreĝo", loĝas en Versailles, apud la ĉefurbo. Pro tio, dum tiu periodo, la pli multo el la kasteloj konstruiĝis ĉirkaŭ Parizo. Tamen, nia regiono, ĉiam alloga por la Grandsinjoroj, vidas la ekstarigon de belaj domegoj. Ni jam vidis interesajn ekzemplojn de la klasika arto en Blois kaj Ussé. Ni havas tempon sufiĉan por vidi la plej karakterizan kastelon de tiu epoko.

Cheverny estas belega kaj impona. Ĝia harmonia simetrio, ĝiaj rektaj linioj, la altaj ardezaĵ tegmentoj, el kiuj la plej grandaj ĉe la ekstremaĵoj estas konveksetaj, montras al ni unu el la plej perfektaj modeloj de la klasika arto. Ĝi estas ankoraŭ parte loĝata. La loĝantoj prizorgas ĝin kun tia sukceso, ke, en la viziteblaj partoj, oni povas kredi pri la aktuala ĉeesto de ĝiaj loĝintoj. La ĉambroj estas lukse meblitaj kaj ornamitaj per belaj pentraĵoj, murtapiŝoj kaj valoraj artaĵoj. La reĝa ĉambro estas aparte admirinda: pentraĵoj sur la plafono kaj la muroj bildigas scenojn el la greka mitologio; murtapiŝoj prezentas la vivon de Uliso. Tiu kurioza ĉambro estas trafa ekzemplo de la tiama luksego. Antaŭ la kastelo, bela franca ĝardeno harmoniiĝas kun la konstruaĵo.

La tragedia periodo de la franca Revolucio ne estis favora al konstruado. Plie la vivkondiĉoj multe ŝanĝiĝis. La grandaj riĉaj familioj malaperis. Tamen, je la fino de la XVIII-a kaj komence de la XIX-a jarcentoj, konstruiĝis

multaj belaj domegoj, nuraj kasteletoj kompare kun la kolosoj de la pasintaj jarcentoj. Veturante en nia provinco, ni povas vidi multajn, starantajn sur monteto aŭ ĉe la bordo de rivero. Nia plaĉa kastelo Grésillon estas tipo de tiuj kamparaj loĝejoj. Nia epoko ne perdis la ŝaton de belaj konstruaĵoj. Sed nun la konstruantoj ne estas unuopuloj, sed kolektivoj. Trafa ekzemplo estas la urbodomo de Tours konstruita je la komenco de nia jarcento. Ĉu ĝi ne estas majesta luksega moderna kastelo, tiu domo, posedaĵo de ĉiuj urbaj loĝantoj? Ĝi estas unu el la plej belaj verkoj de la baroka stilo kaj ege vizitinda. La nova urba biblioteko staranta ĉe la bordo de la rivero estas unu el tiuj modernaj kasteloj, ĉies posedaĵo. Kun la nove konstruita kvartalo, kiun ĝi superstaras, ni povas vidi la naskiĝon de nova arkitektura stilo. Simplaj linioj, ebenaj surfacoj, grandiozaj tutaĵoj. La plej bela ornamo de tiuj domaroj estas la kontrastoj de lumo kaj ombro. Neceso de rapida konstruado por ripari la militajn detruojn, ĉiam kreskantaj postuloj de komforto kaj higieno starigis antaŭ niaj arkitektoj malfacilan problemon. Ties solvo kreis novan stilon, kiu estos marko de nia epoko.

Ne kompleta estus nia vojaĝo, se ni ne vidus la Loire kastelojn ankaŭ dum nokto. La nokta traveturado estas vere ensorĉa. La iluminataj kasteloj aperas de malproksime,


ĉirkaŭataj de luma nimbo. La potencaj lumoj de la reflektoroj montras la fasadojn laŭ neatendita maniero, rivelas belajn detalojn kaj, per la kontrasto de lumo kaj ombro reliefigas la arkitekturajn liniojn. Laŭvoje, kapeloj, vilaĝaj preĝejoj, ankaŭ iluminataj, subite eliĝas el la mallumo. Neforgesebla estas tia ekskurso. Ĉar al la ludo de la reflektoroj aldoniĝas la voĉoj de niaj plej ŝatataj artistoj, muzika melodio rebildigas la vivon de la kasteloj kaj ties loĝintoj.

La alte arta kaj kultura valoro de tiuj spektakloj daŭre ricevas grandegan sukceson. Ĉiujare milionoj da vizitantoj ĉeestas la sonlum-spektakloj en Chenonceaux, Chambord, Azay-le-Rideau, Le Lude...

Nu, karaj gesamideanoj, finiĝis nia senmova vojaĝo tra la lando de l'kasteloj, kaj tra la jarcentoj. Nur dezirindas, ke vi povu fari reale almenaŭ parton de tiu vojaĝo; ĝi ne elrevigos vin, kaj certe restos unu el viaj plej belaj memoraĵoj de via restado en nia bela regiono.

Eloi MOTILLON

(El prelego farita en la Esperanto-Domo Grésillon)



La blinduloj kaj Esperanto

Ni revenu al la riĉoplenaj komencjaroj, kaj evidente al Cart, la "paĉjo" de la blinduloj. Li kontaktas instruiston en la pariza blindinstituto, Edgard Guilbeau, ges-rojn Poittevin, kiuj preparos tekstojn por lernolibroj, kaj s-ron Couillard, kiu ilin presos en Amiens. Je 4 000 radikoj disponas la blinduloj, kio ne estas malgranda vortprovizo. Lertan aranĝon oni elpensas pri la vortararo: por eviti temporabajn kaj multekostajn represadojn oni kompostas la kliŝojn tiel, ke vidalvide al la esperantovorta kolumno povu esti uzata ia ajn lingvo.

Sed mankas...mono. Des pli grava problemo, ĉar la blinduloj, tro longe taksataj almozpeturuloj, malŝatas ricevi monsubtenojn de la vidantoj. Cerbumado helpas: f-ino Zabillon d'Her starigas loterion por ebligi la publikigon de tutmonda gazeto. Oni proponas konkurson por elekti ties titolon. Venkas la duvortaĵo de f-ino Karin Hoejer: "Esperanta Ligilo". Komenciĝas vigla kunlaborado. La brajligotajn tekstojn Cart elektas, manskribas kaj sendas al ge-Poittevin; ĉi lastaj siavice transsendas la brajl-ajojn al Couillard, kiu preslaboras. Tiu elturniĝemulo flankengardas kliŝaĵojn reproduktantajn la plej valorajn novelojn por aparta reeldono laŭ broŝuritaĵoj kajeretoj.

Ni insistu pri la unuaranga rolo de la interkomunikila organo "E.L.", sur kies kovrilpaĝo legeblas: "Lingvo internacia por blinduloj". Ĝisfine de la jaro 1905 ĝi aperas dumonate po 32 paĝoj. Tri fojojn Cart eldonigas adresaron por faciligi la interblindulajn rilatojn, "por iom da konsilo aŭ por intelekta refreŝigo" (Joseph Kreitz). La eldonita en 1913 jarlibro entenas pli ol 800 blindulnomoj el 20 landoj. La kulturcelo estas atingata, ĉar

unuaflanke nelongaj verkoj legeblas felietone en "E.L.", duaflanke la blinduloj mem komencas proze kaj verse verki. Cart informas pri la internaciaj kongresoj kaj konigas la zamenhofajn paroladojn. Kaj li ne ĉesigas siajn ĉiumonatajn leterojn al la blindul-legantaro, kiam Thilander transprenas la tutan respondecon pri la gazeto (1912-1913), ĝin riĉigante per du kromaj somernumeroj al la blindulproblemoj dediĉitaj. Ĉiam plivastiĝanta amika reto perkoresponde direktas al li demandojn, sugestojn, petojn: kial ne rezervi difinitan paĝon por ŝakludantoj? Kial ne starigi kaj proponi muzik- kaj matematiknotacion? Kial ne antaŭvidi rubrikon por priskribo de helpipovaj laboriloj kaj reciprokado de laborspertoj? Li kaj edzino senmanke plenumadas la ĝojoportan sed forkonsuman taskon. Sed post oktobro 1915, "E.L." tri longajn jarojn mutos en tristo.

Antaŭ la milito multobliĝantaj presejoj multobligas studlibrojn kaj literaturaĵojn (en Francujo, ekzemple, aperas la zamenhofa traduko de "Marta", la fama romano de Eliza Orzeszko). Jam en 1910 sindonemaj gesamideanoj punkton post punkto brajligas Esperanto librojn. Punkton post punkto, ili pacience oferas horojn por laborego, kies longeco kaj tedo povas esti taksataj nur de brajlopraktikantoj. En Anglujo dudeko da bonvolemuoj senpage brajligadas amason da volumoj.

Se sur kulturkampoj neanstataŭigeblaj montriĝas legeblecoj kaj legomaterialo, aparte substrekindas tute nova oportuno al sorto-favorataj blinduloj proponata pere de Esperanto, t.e. eksterlanden vojaĝi kaj eksterlande gastigi. Elinter tiuj blindulvojaĝoj ni priskribu tiun de la rusa muzikisto Eroŝenko, kies forpaŝo malĝojigis la esperantistaron antaŭ kelkaj jaroj.

En februaro 1912 tiu bonŝanculo forveturas el Moskvo ironte al Londono. En ĉiu stacidomo, kie necesas, ke li elvagoniĝu kaj ŝanĝu la trajnon lin akceptas kaj helpas U.E.A. delegito. Li estas dorlotata en britaj familioj ĝis la monato

majo. Tiam lin gastigas porblindunia kolegio en Norwood ĝis la aŭgusta libertempo. Poste li enŝipiĝas rehejmenigonte. (Oni notu preterpase la apartan sindediĉon de samideano Phillimore, kiu ne limigis sian helpemon al Eroŝenko, sed ankaŭ zorgis pri John Bergh el Finnlando). Kaj Joseph Kreitz, la jam citita germana aŭtoro de "Historio de la Esperanto movado inter la blinduloj" (brajla eldono), emfazas, ke okaze de vojaĝoj tia-specaj la rondo de liaj Esperanto-konatoj plivastiĝis. Li mencias interalie fruktoportan travivitaĵon en blindulinstituto apud Bruselo, kie proksimume 150 geblinduloj scipovis Esperanton ĝis la grado de flua interbabilado.

Ne subtaksante la gravecon de unuopula vojaĝado, ni notu, ke ekde 1905 (Bulonjo-ĉe-maro) iel kulminas la movada vivo dum la universalaj kongresoj. Ne mirige do, ke en Genevo (1906), Cart proponas, ke blindulojn oni venigu kaj prizorgu. En Kembriĝo (1907) ĉeestas 25 blinduloj el diversaj landoj, inkluzive de tri Usonanoj. Ili ĝojas manpremi kun Zamenhof. Al la salutfrazoj de Thilander elparolataj li jene respondas: "Dankon pro tiu neateridita kuraĝigo! Jes, profesoro Cart rakontis al mi pri via intensa uzado de Esperanto. Nenio ĝojigas tiom mian koron, kiel tiu scio...Estu benata via laboro por Esperanto, la laboro de niaj senvidaj fratoj." Kaj samideano Ketterer, el Svisujo, laŭtresumas ĉies enkorajn pensojn: "Esperanto estas la plej granda progreso efektivigita por ni blinduloj dum tiuj ĉi lastaj jaroj. La lernado kaj scipovo de Esperanto plilarĝigas nian horizonton kaj permesas al ni partopreni plene je la vivo de la homa socio; Esperanto estas niaj kondukanto kaj espero."

En Dresdeno (1908) la blinduloj partoprenas po 9; en Antverpeno (1911) po 17. De Antverpeno al Vaŝingtono blindaj samideanoj portas la flagon. Kaj ekkrias Zamenhof: "Tio estu simbolo por ni ĉiuj, ke io ajn povas esti farita per bona volo." Kelkaj partoprenas

en Krakovo (1912) kaj Berno (1913). Sed ve! ne povos okazi la antaŭvidita impona blindulkunveno en Parizo.

Estus tro longe, landon post lando citi ĉiujn atingitaĵojn. Ni limigu je du, ĉar aparte signifaj.

En Ĉeĥoslovakio (jam 22 gelernantoj studas Esperanton en 1904), enfokusiĝas nova faceto de la Esperanto kontribuadoj: ĉu ĝi ne estus la dezirinda komunikilo inter Germanoj, kiuj ne ŝatas uzi la ĉeĥan, kaj Ĉeĥoj, kiuj flegas similan maŝaton al la germana?

Se nun ni transoceanigas, ni konstatas, ke en 1905 12 bostonaj lernantoj fondas Esperanto-klubon. Samjare la blindaj samideanoj aranĝas sukcesoplenan koncerton kaj ludas du komedietojn en Esperanto.

Ĉu el ĉio tio ne evidentiĝas, ke de jaro al jaro forta Esperanto impulso kaj multdirektaj Esperanto rimedoj potence instigas plivigliĝantan blindularon kaj ĝin alirigas al la antaŭ-difinitaj atingitaĵoj: akirebleco de propra kulturo, malfermiĝo al la tutmondo, interhelpe?

S. BONIOL



Permana deĉifrado de Braille-teksto.

Bileto de Blankbarbulo (Th. Cart)

Inter la diversaj aplikoj de Esperanto unu el la plej interesantaj estas vere tiu en la mondeto de la blinduloj. Instrua ĝi ankaŭ povas esti por la vidantoj. Malrapida estis tie la propagando, sed despli certa. Iom post iom pligrandiĝis tute regule la rondo de la blindaj adeptoj. Esperanto tie estis konsiderata tuj de la komenco, kiel vivanta praktika lingvo: ĝin oni simple uzis kaj, trovinte ĝin facila, agrabla al la oreloj kaj en ĉiuj rilatoj tute taŭga, oni sendiskute daŭrigis ĝian uzadon kaj konfide ĝin disvastigis inter aliaj blinduloj. Pri mankoj en la lingvo, pri nelokigaĵoj en la derivado, pri nesufiĉeco de l'vortaro oni tie neniam parolis; ĉar aliparte la malfacilaĵoj de la punktrelefata legado kaj skribado estis, feliĉe, grava barilo kontraŭ ĉiuspecaj reformistoj aŭ ĉiamaj plibonigistoj, al la blinduloj neniu alportis el ekstere la senfinan kritikismon, la ĉion detruantan dubon pri la valoro de la uzita, uzata kaj uzota internacia komunikilo. Pri aliaj diversaj disputotaĵoj ili ankaŭ ne aŭdis kaj ne perdis sian tempon; sed ili opiniis ĉiuj, ke la sola nuna tasko estas varbi kiel eble plej da novaj samideanoj kaj ilin konservi.

Certe gravaj estis la malfacilaĵoj en la unua tempo. Al ĉiuj eminentaj blinduloj aŭ blindamantoj mi skribis por altiri ilian atenton pri Esperanto kaj la Blinduloj. Al ĉiuj imperiestroj, reĝinoj aŭ ŝtataj prezidantinoj en Eŭropo mi sendis petskribon. El tiuj ĉi unu sola respondis, la reĝino de Svedujo, kaj verdire nur dank'al intermeto de sveda konsulo, kiun konvinkigis niaj Lyonaj samideanoj.

Financan helpon alportis al la komencanta afero kelkaj el la eldonejoj de miaj lernolibroj ĉe Hachette aŭ ĉe Presa Esperantista Societo, la Pariza grupo kaj precipe

nia bona feino S-ino Karnfaing Zablon d'Her. Sian kunlaboradon donis aliflanke kelkaj aliaj inter la vidantoj, kiuj, kiel multaj diverslandaj blinduloj, pardonos, se ilin mi ne nomas tie ĉi.

Kaj nun vere genia blindulo, la sveda H. Thilander, kiu scipovas multajn modernajn lingvojn, kaj kies inteligenteco estas tiel vasta, kiel lia koro, prenis sur sin la redaktadon kaj presadon de "Esperanta Ligo", la reliefpresita gazeto, kiun mi fondis antaŭ naŭ jaroj. Al tiu ĉi gazeto, dank'al sia speciala kompetenteco, al sia ĝenerala kulturo kaj al siaj rilatoj kun ĉiulanda eminenta blindularo li donos plenan fakan intereson kaj novan gravan impulson dum miaflanke mi daŭrigos la eldonadon de libroj por blinduloj.

Plenkonfide niaj blindaj samideanoj povas do rigardi antaŭen. Ĉar en ilia movado estis zorge evititaj ĉiu vana disputo, ĉu lingva, ĉu alia, ĉu danĝera pligrandigo, ĉu signifa bruoj, ĉu "blufo"; la pacience akiritajn postenojn ili certe konservos kaj tion, kion mi diris en Genevo mi povas nun pli firme ripeti: "Neniu monda okazintaĵo, kiel grava ĝi estus, neniu revolucio, neniu milito povos estingi la malgrandan flameton, kiu nun brilas en tiu aparta mondeto". En ĉiuj cirkonstancoj fidelaj gvardistoj de l'sankta fajro restos niaj blindaj fratoj.

En Cambridge blindulo elokvente dankis la esperantistojn, ĉar ili metis en la nigran ĉielon de l'blinduloj la brilan verdan Stelon, kaj nun ili vidas!

Se iam pro iu aŭ alia kaŭzo la Stelo devos malaperi el nia ĉielo al ni vidantoj, ĝin montrus ree al ni la "vidantaj" blinduloj.

Ĉu tio ne estas grava motivo, por ke ni estu dankaj al ili kaj interesiĝu varme pri ilia sorto?

(Tiu artikolo aperis en la revuo "Esperanto" la 20-an de junio 1913 en la regula kroniko de Théophile Cart titolita "Bileto de blankbarbulo".)

HIMNO AL DIO ATONO

Tiu himno originas el la antikva Egiptio, kaj datiĝas de la Nova Imperio, ĉirkaŭ 1370 a.J.K. Ĝi estis skribita eble de la faraono mem: Amenofiso la kvara, Aĥnaton, mistika kaj idealista. Ĝi troviĝas en unu tombo de Tell-el-Amarna (Egiptio). Ĝi estas je 13 kolonoj longa.

Aĥnaton estis alnomita "hereza faraono", ĉar li volis starigi veran universalan kaj pacistan monoteismon: la kulton de la suna disko, Atono, vivokreinto. Samtempe li volis malproksimiĝi de la tro potenca kaj koruptiĝinta amona pastraro, kiu tro sin entrudis en la reĝan politikon. Sed li fiaskis. Multe da bibliaj tekstoj inspiriĝis el la penso de Aĥnaton, inter alie la 104-a psalmo.

Resume, estas himno al la ... suna energio!

Mi tradukis ĝin el la hieroglifoj tre laŭvorte, por speguli la egiptan frazeologion. Mi konfesas ke mi ankaŭ cerbumadis...

Ci aperas bele sur la ĉiela horizonto,
Ho! Vivanta Atono! (=la suno, pli ĉefe la suna disko)
Ekiganto de la vivo!
Ci leviĝas sur la orienta horizonto,
Ci plenigas ĉiun regionon per cia beleco.
Ci estas bela, granda, brila, alta super la tuta tero.
Ciaj radioj ĉirkaŭas la landojn, ĝis la limo de ĉio, kion ci kreis.
Ĝi estas Rao (suna dio kaj emiria dio).
Ci atingas ilin ĝis iliaj limoj.
Ci subigas ilin por cia filo (=faraono), kiun ci amas.
Ci estas malproksima, sed ciaj radioj estas sur la tero.
Ci estas antaŭ ni, sed oni ne vidas cian iradon.
Ci subiras sur la okcidenta horizonto,
Tiam la tero estas en la mallumoj, kvazaŭ mortinta;
La dormantoj en la ĉambroj havas la kapon kovrita,
La okulo ne povas vidi la kompanon;
Se oni ŝtelas iliajn havaĵojn, lokitajn sub ilia kapo, ili ne scias tion.
Ciuoj leonoj eliras el sia rifuĝejo,
Ciuoj reptiloj mordas,
Tenebras kiel en bakujo.
La tero estas en la silento;
Ĝia kreinto ripozas en sia horizonto.
La tero brilas, kiam ci leviĝas horizonte kaj lumaŝ sundiske dum la tago.
Ci forigas la mallumojn, ci donas ciajn radiojn,
Tiam la Duobla Lando (=Egiptio norda kaj suda) estas en festo.
La homoj vekiĝas kaj leviĝas sur siaj piedoj.
Ci starigas ilin.
Puriginte sian korpon, ili surmetas siajn vestojn.
Iliaj brakoj faras adoroĝestojn al cia leviĝo.
La tuta tero eklaboras.
Ĉiu brutaro ĝojas pri sia paŝtaĵo.
Arboj kaj herboj verdiĝas.
La birdoj ekflugas el sia nesto, kun siaj flugiloj adorade al si.
Ĉiu brutaro karakolas sur siaj kruroj.
Kiuoj flugas kaj alteriĝas, ĉiuoj vivas, ĉar por ili ci leviĝas.
La ŝipoj ŝipas laŭflue kaj kontraŭflue.
Ĉiu vojo estas apertita kiam ci aperas.
El la riveroj la fiŝoj eksaltas al ci:
Ciaj radioj eniras internen de la Tre-Verda (=la maro).

Kreinto de la feto en la virinoj,
 Kreinto de la semo en la viroj,
 Kiu vivigas la filon en la virina ventro,
 Kiu pacigas lin per tio, kio haltigas liajn larmojn.
 Nutristo en la virina sino, kiu donadas la spiron por viviĝi ĉiujn siajn kreitaĵojn,
 Kiam unu eliras el la utero, por spiri,
 Tiam ci komplete malfermas ĝian buŝon,
 Ci prizorgas ĝiajn bezonojn.
 Kiam la birdo en la ovo pepas en la ŝelo,
 Tiam ci donas, interne de ĝi, la spiron, por ke ĝi vivu.
 Ci kompletigas ĝin, por ke ĝi frakasu sian ŝelon el interne.
 Ĝi eliras, komplete, el la ovo, por pepi.
 Ĝi paŝas sur siaj piedoj, kiam ĝi eliras el ĝi.
 Kiom multaj estas tiaj faritaĵoj, kvankam kaŝataj al la vidado!
 Ho! Dio ununura kaj sensimila!
 Ci kreis la teron laŭ cia deziro, dum ci estis sola,
 Ĉiujn homojn, ĉiajn brutojn kaj gregojn,
 Ĉion, kio surtere paŝas sur piedoj,
 Ĉion, kio alte flugas per flugiloj,
 La sirian kaj sudanian landojn,
 La egiptan landon.
 Ci lokis ĉiun en lia loko.
 Ci prizorgas ĉies bezonojn.
 Ĉiu posedas sian nutraĵon. La vivdaŭro estas kalkulita.
 La lingvoj distingiĝas per la paroloj,
 Same la karakteroj.
 La haŭtoj estas diferencaj: ci diferencigis la alilandanojn.
 Ci kreas Nilon (= dio Hapio) en la subtera mondo.
 Ci alportas lin laŭ cia deziro, por viviĝi Egiptojn, kiel ci kreis ilin por ci,
 Mastro de ĉiuj, kiuj laciĝas por ili.
 Ho! Mastro de la tuta tero, brilanta por ĝi!
 Ho! Taga Atono (= taga sundisko), granda je majesteco!
 Ĉiujn malproksimajn alilandanojn ci vivigas:
 Ci lokis Nilon ĉielon, li gutefalas por ili (= la pluvo).
 Li kreas ondojn sur la montoj, kvazaŭ la Tre-Verda por irigacii la kampojn
 de iliaj urboj.
 Kiel bonegaj estas tiaj planoj!
 Ho! Mastro de eterneco!
 Nilon ĉiele ci donis al la alilandanoj kaj al ĉiaj alilandaj gregoj paŝantaj
 sur kruroj.
 Nilon venantan el la subtera mondo ci donis al Egiptio.
 CIAJ radioj nutras ĉiujn kampojn.
 Kiam ci brilas, tiam ili vivas, kreskas por ci.
 Ci faras sezonojn por vivdoni al ĉiaj, kiajn ci kreis,
 La vintron, por ke ili refreŝiĝu,
 La varmegan blovon, por ke ili gustumu cin.
 Ci kreis la malproksiman ĉielon, por tie brili, por rigardi ĉion, kion ci kreis.
 Ci estas ununura, kiam ci brilas en tiaj formoj de vivanta Atono (=sundisko).
 Kiam ci leviĝas, lumas, foriĝas kaj ree proksimiĝas.
 Ci kreas milionojn da formoj nur el ci mem.
 Urboj, vilaĝoj, kampoj, vojoj, riveregoj,
 Ĉiuj okuloj rigardas cin fronte al si.
 Ci estas la taga sundisko (=Atono) super la tero.
 Ci estas en mia koro.
 Neniu alia konas cin, krom cia filo, Neferĥeperura Uaenra (= faraono Aĥnaton).
 Ci permesas, ke li sciu pri tiaj intencoj, pri cia potenco.

tradukis Françoise CLARY

La tri senkantaj mesoj

A. Daudet - trad. A. Ribot

"Du trufitaj meleagroj, Garrigou?"

"Jes, respektindulo, du meleagroj belegaj, ŝtopitaj per trufoj. Mi estas kredinda, ĉar mi helpis por plenigi ilin. Oni preskaŭ timis, ke ilia haŭto disŝiriĝos, tiel streĉita ĝi estis!"

"Jesu-Maria! Mi tiel arde ŝatas trufojn! rapidu, pasigu mian surplison, Garrigou. Kaj krom la meleagroj, kion plian vi vidis en la kuirejo?"

"Ho! Ĉiuspecajn bongustaĵojn! Ekde tagmeze ni senplumigis fazanojn, upupojn, tetraojn kaj tetrojn. Ĉien disflugis la plumoj. Poste, de l'lageto, oni alportis angilojn, orkolorajn karpojn, trutojn, ktp..!"

"Kiel dikaj estis la trutoj?"

"Dikegaj...tiaj, respektindulo, Enormaj..."

"Ho! Dio, ŝajnas al mi, ke mi jam vidas ilin. Ĉu vi plenigis la buretojn?"

"Jes, respektindulo, mi metis la vinon en la buretojn, sed certe ĝi ne egalos tiun, kiun vi trinkos post la noktomeza meso. Se vi povus vidi tion en la manĝoĉambro de la kastelo, ĉiujn karafojn, kiuj brilegas, plenaj je ĉiukoloraj vinoj...Kaj la arĝentan teleraron, la ĉizitajn surtablaĵojn, la florojn, la kandelingojn. Neniam antaŭe oni vidis tiaspecan noktofestenon! Lia markiza Moŝto invitis ĉiujn Nobelsinjorojn ĉirkaŭajn. Vi nombros almenaŭ kvardek, krom la juĝisto kaj la notario...Ha!...Vi estas ja, tre bonŝanca, ke vi partoprenos! La nura flarado de la meleagroj, rezultas, ke la odoro de la trufoj sekvas min ĉien!"

"Nu,nu, filo! Ni atentu ne peki pro tromanĝemo precipe dum Kristnaska Nokto. Rapidu, ekbruligu la kandelojn, kaj sonorigu la unuan alvokon por la meso; ĉar alproksimiĝas noktomezo kaj necesas ne prokrasti..."

Tia babilado okazis iun Kristnaskan nokton de l'dibenita jaro mil sescent kaj aliaj jaroj inter

la Reverendo Dom Balaguère iama prioro de la monaĥoj de Sankta Barnabo, nun salajrata kapelestro de la Nobelsinjoro de Trinquelage kaj lia akolito Garrigou aŭ tiu, kiun li opiniis esti la akolito Garrigou, ĉar vi devas scii, ke ĉi nokte, la diablo surpronis la rondan vizaĝon kaj neprecizajn trajtojn de la juna sakristiano por pli bone tenti la respektindan pastron kaj instigi lin terure peki pro tromanĝemo. Do, dum la supozata Garrigou tutbrake kariljonis je la sonoriloj de la sinjora kapelo, la Reverendo surmetis sian kazublon en la eta sakristio de la kastelo; kaj kun sia spirito jam nebula pro ĉiuj gastronomiaj priskriboj, li ripetis al si mem dum li sin vestis: "Rostitaj meleagroj, orkoloraj karpoj, trutoj enormaj!"

Ekstere la nokta vento blovadis, dissendante la muzikon de la sonoriloj, kaj lumigiloj aperis el la ombro sur la deklivoj de la monteto Ventoux, ĉe kies supro staris la malnovaj turoj de Trinquelage. Tio estis familioj de farmistoj, kiuj alpaŝis al la nokta meso en la kastelo. Ili grimpis la deklivon, kvin-aŭ sesope, kantante kun la patro antaŭe portanta lanternon enmane. La virinoj envolviĝis en siaj grandaj senmanikaj brunaj manteloj, en kiuj la infanoj trovis ŝirmejon. Malgraŭ la horo kaj la malvarmo, tiuj bonaj homoj iris ĝoje, kuraĝigataj de la penso ke, ĉe la fino de la meso, ili trovos, kiel kutime, manĝon preparitan por ili mem en la kuirejo de la kastelo. De temp'al tempo, sur la peniga deklivo, la karoso de iu nobelsinjoro antaŭata de torĉo-portantoj, briligis siajn vitraĵojn en la lunlumo, aŭ mulino trotadis svingante siajn tintilojn, kaj dank'al la lumeto de la lanternoj, ĉirkaŭataj de nebuleto, la kamparanoj rekonis sian juĝiston kaj lin salutis pasante: "Bonan, bonegan vesperon, majstro Arnoton!" - "Bonan, bonegan vesperon, karaj!"

La nokto estis hela, la stelojn vigligis malvarmo; kaj tre eta grajlo, kiu glitis sur la vestoj, ne malsekigante ilin, fidele konservis

la tradicion de la neĝoblankaj Krist-naskaj festoj. Tute ĉe la supro de la deklivo, la kastelo aperis, kiel la unika celo, kun sia impona amaso da turoj, pinjonoj; la sonorilturo alte staris en nigre blua ĉielo kaj amaseto da lumetoj iris, venis, svingiĝis ĉe ĉiuj fenestroj kaj similis, sur la malhela fono de la konstruaĵo, la fajrerojn kurantajn en la cindroj de ĵus bruligitaj paperoj. post la levponto kaj poterno, por atingi la kapelon, necesis trairi la unuan korton plenan je karosoj, lakeoj, portoseĝoj; kaj tute helan pro la flamoj de la torĉoj kaj la kuirejaj fajroj. Oni aŭdis la tintadon de la rostil-turniloj, la bruegon de la kaseroloj, la kunpuŝiĝon de la kristaloj kaj arĝenta manĝilaro, prepare al la manĝo; super ĉio tepida vaporo bonodorigis la rostitajn viandojn kaj la maldolĉaj herboj de la komplikaj saŭcoj pensigis la kampulojn same kiel la kapelanon, kaj la juĝiston, kaj ĉiujn: "Kiel bongusta noktomanĝo, post la meso..."

Drin, drin, drin! Drin, drin, drin!...La noktomeza meso komenciĝas. En la kapelo de la kastelo, miniatura katedralo kun interkrucigitaj arkaĵoj, kaj kverkaj lignaĵoj, tiel altaj kiel la muroj, la tapetoj estas freŝe etenditaj kaj ĉiuj kandeloj donas sian lumon. Kiom da homoj, kiom da tualetoj! Unue, sidante en la sidfakoj ĉirkaŭ la korusejo, la nobelsinjoro de Trinquelage en sia vesto de salmkolora tafto kaj apud li, ĉiuj nobeloj invititaj. Vidalvide, sur velurgarnitaj preĝoseĝoj sidis la maljuna markizino, vidva, en sia robo de fajrokolora brokaĵo kaj la juna Sinjorino de Trinquelage kronita per alta turo el gladita punto laŭ la plej freŝa modo ĉe la franca kortego reĝa. Pli malsupre estas rekoneblaj nigre vestitaj kaj zorge razitaj, kun grandaj perukoj, la juĝisto kaj la notario, ambaŭ seriozaj makuloj inter la buntaj silkoj kaj la spindelaj damaskoj. Poste enviciĝis la dikaj ĉefservistoj, paĝioj, ĉashelpantoj, intendantoj, sinjorino Barbe kun sia ŝlosilaro flanke pendanta. Funde, sur la benkoj, troviĝas la etranguloj, servistinoj, farmistoj kun siaj familioj; fine, plej fore, kontraŭ

la pordego, kiun ili senbrue movas, sinjoroj kuirhelpantoj, kiuj, inter du saŭcoj, venas enspiri iom da mesetoso kaj alporti odoron de festeno en la preĝejon festantan kaj tepidan pro la kvanto da brulantaj kandeloj.

Kio senatentigas la mesfaranton? Ĉu la vidado de tiom da blankaj kaj buntaj vestaĵoj? Ĉu ne, prefera, la sonorileto de Garrigou, tiu diabla sonorileto, kiu svingiĝas ĉe la piedo de l'altaro kun infera hasto kaj laŭŝajne senhalte ripetas: "Ni rapidu! Ni rapidegu! Ju pli frue ni finos, des pli frue ni ĉetabliĝos!" Estas vere, ke ĉiufoje, kiam tintas tiu diabla bruilo, la kapelano forgesas sian meson kaj pensas nur pri la noktofesteno. Li imagas la kuiristojn, la fornojn, kie ardas fandkapabla fajro, vaporon, kiu ŝvebas supren el la kovriloj duonfermitaj kaj en tiu vaporo du mirinde belajn meleagrojn ŝtopitajn per trufoj. Aŭ li vidas vicojn da paĝioj, portantaj pladojn envolvitajn en allogaj vaporoj, kaj kun ili, li eniras en la ĉambregon jam pretan por la festeno. Ha! Delicoj! Jen la vasta tablo tute plena kaj disradianta, la pavoĵ ankoraŭ vestitaj je siaj plumoj, la fazanoj disetendantaj siajn orbrunajn flugilojn, la rubenkoloraj boteletoj, la piramidoj da belegaj fruktoj, inter la verdaj branĉoj kaj tiuj mirigaj fiŝoj, pri kiuj parolis Garrigou, kuŝantaj sur tavoloj de fenkolo kun perlamota skvamo kvazaŭ ili ĵus venus el la akvo, kun bukedo de odorantaj herboj en iliaj naztruoj. Tiel potenca estas la vidado de tiaj mirindaĵoj, ke ŝajnas al Dom Balaguère ke tiuj belegaj pladoj kuŝas tie, antaŭ li, sur la brodaĵoj de la altartuko, kaj du au trifoje, anstataŭ "Dominus Vobiscum" li surprizas sin recitante "Benedicite". Ekster tiuj negravaj eraretoj, la respektinda viro progresigas sian diservon tre konscience, sen forgesi unu linion, sen forigi unu genuflekson, kaj ĉio disvolviĝas sufiĉe kontentige ĝis la fino de l'unua meso; ĉar vi scias, ke en la tago Kristnasko la sacerdotoj devas celebri tri sinsekvajn mesojn.

"Jen! For l'unua!" diras al si mem la kapelano kun kontenteca suspiro; kaj sen malŝpari unu minuton, li mansignas al sia akolito aŭ al tiu, kiun li opinias sia akolito. Drin, drin, drin...Drin, drin, drin!.. La dua meso komenciĝas kaj samtempe komenciĝas la peko de Dom Balaguère. "Haste! Hastege! Ni rapidu!" krias per sia akreta voĉo la sonorileto de Garrigou kaj ĉi foje, la kompatinda celebranto, tute donante sin al la demono de tromanĝemo, impetas sur la meslibro kaj voras la paĝojn per la avideco de sia superekcitita apetito. Li furioze genufleksas, leviĝas, nur skizas la krucsignojn, mallongigas ĉiujn gestojn por pli frue atingi la finon. Ĉe l'Evangelio, li apenaŭ etendas siajn brakojn, frapas sian bruston ĉe la Confiteor (mi konfesas miajn pekojn). Inter la akolito kaj li estas vetrapida fuŝprononco. Versetoj kaj responsorioj interpuŝiĝas. La vortoj, duonprononcataj per preskaŭ fermita buŝo por ŝpari tempon, finiĝas en nekompreneblaj flustraĵoj. Same kiel urĝemaj vinberrikoltistoj, kiuj premas la berojn en la kuvo, ambaŭ baraktas en la meslatino, dissendante ŝprucaĵojn al ĉiuj direktoj. Ripetfoje la malbeninda sonorileto estas tie por krei ĉe iliaj oreloj, kiel tiuj tintiloj, kiujn oni almetas al la diliĝencaj ĉevaloj por fulmorapide kurigi ilin. Imagu! Laŭ tiuj kondiĉoj, senkanta meso estas rapide for! " Jen for la dua!" pensas la kapelano tute senspira; kaj ne prenante unu minuton por enspiri, ruĝvizaĝa, ŝvitanta, li preskaŭ saltas la ŝtupojn de l'altaro. Drin, drin, drin...Drin, drin, drin!..

Nun li komencas la trian meson. Nun nur kelkaj paŝoj apartigas lin de la manĝoĉambro, sed, ve! laŭmezure kiel la festentempo alproksimiĝas, la malbonŝanca Balaguère konscias pli kaj pli pri furiozo de senpacienco kaj voremo. Lia vizio pliintensiĝas: jen la orkoloraj karpoj, la rostitaj meleagroj. Li tuŝas ilin, li...Ho! Dio! La pladoj ellasas vaporon, la vinoj bonodoras kaj per sia tintado la sonorileto krias: " Rapide, rapide, ankoraŭ pli rapide!" Sed kiamaniere? Liaj lipoj apenaŭ moviĝas. Li ne

plu prononcas la vortojn. Escepte se li trompus Dion kaj artifike finus la meson. Kaj tion li faras, kompatinda! laŭ sinsekvaj tento, li unue supersaltas verseton, poste du aliajn. Nun tro longa estas la epistolo; li ne legas ĝisfine kaj ekvortigas la Evangelion, vidas la Credo (mi kredas) sed ne haltas, forigas la "Pater", de malproksime salutas la "Prefacon" kaj per kuradoj kaj saltojn sin ĵetas en la eternan damnadon, daŭre sekvata de la fia Garrigou, kiu mirige konkorde lin helpas, levas la kazublon, turnas duope la paĝojn de meslibro, kolizias kun la pupitroj, faligas la buretojn kaj senhalte skuas la sonorileton pli kaj pli laŭte, pli kaj pli rapide.

Estas vidindaj la mirfrapitaj mienoj de la ĉeestantoj. Ili devas sekvi laŭ la gestoj de la sacerdoto, tiun meson, kies eĉ unu vorton ili ne povas aŭdi; unuj ekstaras, kiam la aliaj surgenuiĝas, aŭ sidiĝas, kiam la aliaj ekstaras; kaj ĉiuj fazoj de tiu stranga diservo konfuziĝas sur la benkoj en mil diversaj sintenoj. La Kristnaska stelo, tie sur la ĉielvojoj, irante al la eta bovejo, paliĝas pro teruro, vidante tian konfuzegon."La patro tro rapidas. Oni ne povas sekvi", flustretas la maljuna nobelsinjoro. Majstro Arnoton serĉas en sia meslibro en kiu momento de la diservo oni troviĝas. Sed tre sincere, ĉi ĉiuj bonaj homoj, kiuj ankaŭ pensaŝ pri festeno, ne plendas, ke la meso antaŭeniras tiel rapide.Kiam Dom Balaguère anoncas" Ite, missa est" (Iru for, la meso finiĝis), la ĉeestantaro unuvoĉe, ĝojoplene respondas "Deo gratias" (Ni dankas Dion).

Kvin minutojn poste la respektinda Dom Balaguère plantis sian forketon en flugilon de tetrao, dronigante siajn konscienc-riproĉojn en inundo de vinoj. Li drinkis kaj voris tiagrade, ke li mortis en la nokto mem. Imagu kian akcepton li trovis en la ĉielo:"Vi envenos en la paradizon, kiam vi farintos tricent mesojn en ĉeesto de ĉiuj, kiuj pekis kun kaj pro vi!" ...

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

La krado de la krucvortoj ne estis ĝusta. Ni petas vian indulgon pri tiu eraro, kiu verŝajne multe laborigis vin.

POR
VIA DISTRO

	A	B	C	D	E	F	G	H	I	J	K
1	E	T	A	T		G		E	F	I	K
2	P	A	R		L	U	K		I	N	O
3	O	R		R	A	B	I	O		T	R
4	S		F		F	E	O		E		O
5		K	A	N		R		O	V	O	
6	C	I	B	E	R	N	E	T	I	K	O
7		S	E	P		A		A	T	A	
8	A		L		U	T	A		I		P
9	N	I		I	Z	O	L	I		E	R
10	A	R	A		I	R	O		T	R	E
11	S	I	L	O		O		P	I	A	N

NOVA PROBLEMO

(S-ro Masclet)

Al kiu apartenas la zebro?

- 1) Estas 5 domoj.
- 2) La Anglo loĝas en la ruĝa domo.
- 3) La Hispano havas hundon.
- 4) La loĝanto de la verda domo trinkas kafon.
- 5) La Ruso trinkas teon.
- 6) La verda domo staras dekstre de la ebura domo.
- 7) La fumanto de "Old Gold" bredas helikojn.
- 8) La loĝanto de la flava domo fumas "Gauloises".
- 9) La loĝanto de la meza domo trinkas lakton.
- 10) La Norvego loĝas en la unua domo.
- 11) La fumanto de "Chester" loĝas apud la proprietulo de la vulpo.
- 12) La fumanto de "Gauloises" loĝas apud la proprietulo de la ĉevalo.
- 13) La fumanto de "Lucky Strike" trinkas oranĝan sukcon.
- 14) La Japano fumas "Gitanes".
- 15) La Norvego loĝas apud la blua domo.

Demandoj: Al kiu apartenas la zebro?
Kiu trinkas akvon?

POR LA SKRABLO-SATANTOJ

En la venonta numero de Kulturaj Kajeroj aperos propono de Skrablo-ludo. Vi povos ludi sur kutima skrablo-tabulo kaj la reguloj samas tiujn de "scrabble". Sed necesas; ke vi pretigu la literojn. Vi estos devigataj mem fari ilin, sur kartono kun blanka flanko, aŭ sur papero kiun vi gluos sur forta kartono antaŭ ol distondi ilin.

Jen la listo de la necesaj literoj aperinta en n° 313 (marto 1979), de Franca Esperantisto". La valoro de ĉiu litero estas indikata interkrampe:

9A(1)-2B(4)-2C(4)- 2Ĉ(4)-2D(2)-9E(1)-
2F(4)-2G(3)-2Ĝ(4)-2H(4)-2Ĥ(10)- 8I(1)-
5J(1)-1Ĵ(8)-5K(1)-3L(1)-2M(2)-4N(1)-
9O(1)-2P(3)-4R(1)-5S(1)-2Ŝ(4)-3T(1)-
6U(1)-1Ŭ(10)-2V(4)-2Z(4)-

LA VIVO EN GRESILLON

GENERALA KUNVENO - 23an de Majo 1992

S-ro Boyet prezidas tiun kunvenon, kiu komenciĝas je la 15-30h. D. Babin anoncas, ke 272 membroj ĉeestas aŭ estas reprezentataj, por kapitalo de 81 100 fr. Post repago de kelkaj akcioj, pro morto de la posedantoj, kaj aliĝo de 5 novaj membroj, la societa kapitalo sumas 211 100 fr.

Financa raporto- Ĉijare la nombro da staĝanoj en komunaj ĉambroj kaj de kampadistoj kreskis verŝajne pro la malaltaj tarifoj. La elspezoj pri salajroj kreskis pro altiĝo de la baza salajro kaj la dungo de plia helpantino en Aŭgusto. La elspezoj pri la nutraĵoj malkreskis pro tre ŝparema kuiristino elturniĝema. La ĉapitro "impostoj-asekuroj" multe kreskis pro la TVA. Finfine minuso estas registrita. Tamen la postkuirejo estis renovigita kaj ankaŭ kursoĉambro. Malnovaj, difektitaj fenestroj estis ŝanĝitaj kaj novaj tabloj aĉetitaj por la kursoĉambroj.

Agadraporto- La partopreno en la diversaj staĝoj en 1991 estis varia. Dum la printempaj ferioj ĉeestis entute iom pli ol tridek personoj el kiuj dek naŭ infanoj. Dum la somero la partoprenintoj estis pli multaj en aŭgusto ol en julio, kontraŭe al la kutimo. La diversnivelaĵoj allogis pli ol la prelegoj. Sed la kurso "Arto traduki" multe plaĉis. Ankaŭ ĉijare ne estis eble organizi komunajn ekskursojn per aŭtobuso. Ĉiuj preferis uzi sian propran veturilon.

D. Babin rimarkigas, ke la nombro da partoprenintoj ne ŝanĝiĝis kompare kun la antaŭa jaro sed la nombro da diurnoj kreskis ĝis 3185. Pluraj aliĝintoj plilongigis sian restadon.

J. Vincent raportas pri la perkorespondaj kursoj: aliĝis 3 lernantoj por la unua nivelo, 12 por la dua, neniuj por la tria. Kelkaj lernantoj, kiuj pli frue aliĝis, finis sian kurson nur en 1991.

Koncerne la elekto de duono de la komitato, la komisiono pri voĉnombrado donas la rezulton de sia laboro:

Voĉdonis: 258 membroj; validas: 251 voĉdoniloj; la 6 kandidatoj estas elektitaj.

Je la 17-30 h. la prezidanto anoncas la finon de la kunveno.

La sekretario: Guy Dairon

Preparado al la Atesto pri Kapableco

de A. RIBOT

3-a eldono reviziita

prezo: 30 f.f.

KOMITAT-KUNVENO - Dimanĉon 24-05-92

La prezidanto, D. Babin, bonvenigas la ĵus elektitajn komitatanojn, S-inon Danièle Gourdon kaj S-ron Philippe Combot. Nova estraro estas elektita. Ĝi konsistas el: Prezidanto: Dominique Babin,
Vic-prezidantino: Bérengère Cheverry
Sekretario: Guy Dairon
Help-sekretario: Henri Boyet
Kasistino: Jeanine Vincent
Help-kasistino: Danièle Gourdon.

Staĝoj 1992- Dum la printempa staĝo 42 infanoj estis akceptitaj, el kiuj 9 ĉeĥinoj. Ĉiuj bone ĝuis la restadon, la kursojn kaj la teatran spektaklon prezentitan de la grupo de Outreau. Ne eblas paroli pri la partoprenado dum la somero, ĉar sperto montras, ke pli kaj pli la aliĝantoj "vekiĝas" lastminute.

Dum la venontaj staĝoj, gvidos kursojn: M.Th. Berger, T. Loskutowa, I. Koutny, C. Venin, J. Vincent, P. Babin, W. Bick, D. Moirand. Prelegos: M. Boulton, B. Cheverry, F. Boyet, P. Métivier. Administros: familio Babin, Ph. Combot, R. Lenel, J. kaj D. Moirand. Juanita Turbillon gvidos korboparadon kaj J. Gauthier fotoarton.

Staĝoj 1993- La prezidanto informas, ke radio-Esperanto Habano petis radiokasedon pri Gresillon kaj la venontjara programo. Tiu registrado estos realigebla venontsomere. Por ebligi la ĉeeston en la prelegoj de la lernantoj de la 2-a kaj de la 3-a nivelaj kursoj en julio, estas proponite, ke la prelegoj okazu komence de la mateno kaj la kursoj nur poste. Provo estos farita jam en 1992. Henri Boyet ricevis proponon de Kimie Markarian por instruado de la uzado de bulkalkulilo kaj faldado de paperoj laŭ la japana arto. Tiu instruado okazos en julio 1993. S-ino Vincent proponas organizi, en majo aŭ junio, semajnon specialan por la studado de la sovaĝaj plantoj en la bieno.

La gastigado de la junaj ĉeĥinoj dum la printempo starigis finanĉan problemon, kiu estis grandparte solvita dank'al la helpo de grupoj kaj unuopuloj. La disponeblaĵoj de la Fonduso Belbona Espero elĉerpigis kaj restas neniu ebleco gastigi eksterlandaj nepagipovaj gejunuloj dum la venonta somero. Estas decidite krei specialan fonduson por la Infana Internacia renkonto de la printempo.

Diversaĵoj- Nun okazas la refarbadon de la antaŭkuirejo kaj la postkuirejo. La renovigo de la lavejo, pavimo kaj muroj, estos farita antaŭ la Printempa staĝo de 1993. Pli efika bruizolado en la klasĉambroj estos realigita, kaj ankaŭ pli efika lumig-sistemo. Prezpropono estis petita de la masonisto pri riparo de la fasadoj de la kastelo. Dank'al sindonema najbaro la dorna vepraĵo, kiu invadis la antaŭan fervojon, estis forfalĉitaj. Oni nun povas promeni tie. Estas ankaŭ necese pristudi la eligon de la sablo kaj de la ŝlimo el la lageto, kaj la purigadon de la banejo.

S-ino Vincent rimarkigas, ke la meblaro de la biblioteko fariĝas nesufiĉa despli ke ni baldaŭ ricevos la libron de Andrey Childs-Mee. Ĉu translokiĝi la libro-servon? Kien ĝin meti? Oni devas trovi respondojn.

D. Babin proponas akiri novan magnetofonon por anstataŭigi la malnovan iom kadukiĝintan. Kiam eblos, finance, estas antaŭvidata la aĉeton de komputilo.


La kunsido finiĝas je la 17-a h.

La sekretario: Guy Dairon

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Konservo de O-finaĵo :


- 1) **por belsoneco**
majstro-verko ; arbo-branĉo ; kudro maŝino.
- 2) **por klareco de la senco**
diosimila ; luodomo.
- 3) **por eviti konfuzon**
feokanto (fekanto) virotemo (virtemo)
orodono (ordono) inofromo (informo).



Kara Samideanino :


Por ĝoje festi Novan Jaron mi invitas vin hejmen. Mi preparis por vi juvelojn perlamotoriĉajn. Mi montras al vi mian kolekton de konkaĵoj. Kaj ni festenos per plej variaj konkoj.

Kompreneble ne timu, ke tiu konkoludo konduku nin al nehonesta konkludo !



Dilemo :

Plej miregiga estas pensi, ke ilin faris la sama artisto ! Mi intencas doni al mia edzino, de kiu mi ricevas tiom da edzinaj kontentigoj, unu el tiuj artaĵoj. Tamen mi hezitas... Edzino-kontentigo estas tiel delikata afero !



Marsaĵoj !

« Kristnasko-Patro » el Marso ĵus elfuzeiĝis en nian halon. Kun plezuro li prezentos al vi, karaj infanoj — kaj al vi modernaj gepatroj —, la tieajn plej mirigajn ludilojn kaj kreaĵojn !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — Exeter, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugalna Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34